Bonan novaĝon: La Limburga Tago denove vivas !

Je tagmeze ni renkontiĝis en Genk, ĉe Kattevennen.
Venis ne nur esperantistoj de nia klubo LEA, sed ankaŭ familianoj (de Ben) kaj 4 personoj el Antverpeno.
Ni manĝis la piknikon, preparitan de Ben kaj ekiris por la promeno.
Ni sekvis vojon tra arbaro kaj kamparo, kaj finfine venis en vilaĝo, kie ni vizitis la kavernon de Lourdes.
Tie oni kantis majajn kantojn (estis ankoraŭ majo). Ĉefe Niki konis la tekstojn parkere.
Post pluan promenado, ni denove ripozis sur benko en la arbaro.
La hundo Jesse ne ĉesis alporti bastonon, kiun ni devis forjeti.
Kiam ni revenis al la deirpunkto, atendis nin esperantisto el la najbareĉo, bone konata de la plej maljunaj esperantistoj: Albert Claesen.
Ni kune manĝis en proksima restoracio, kaj tie restis longe babilante kaj ĝuante la belan tagon.
Ni dankas ĉiujn kiuj partoprenis. Estis agrablan tagon, kun belan veteron.
La membroj de LEA jam havas planojn por la venonta jaro. **La Limburga tago denove vivas !**